

Salutmesaĝo al la 81-a Hokkajda Kongreso de Esperanto

Ĉe la 81-a Hokkajda Kongreso de Esperanto, mi salutas vin ĉiujn, nome de Japana Esperanto-Instituto.

Printempe en ĉi tiu jaro ni havis la centan mortotagon de Ludoviko Zamenhof. Ni notu, ke UNESKO selektis tion kiel unu el la festindaj gravaj 53 aferoj en 2016 kaj 2017. UEA alvokis al esperantistoj en la mondo kampanjon “Zamenhof-Jaro 2017”. Kaj ĉi tiu jaro estas la 130-jara datreveno de la publikigo de Esperanto. Do denove ni rememoru la historion de nia lingvo kaj klopodu por disvastigo de nia lingvo, kiu kontribuos por mondopaco.

Ĉi-novembe pli malfrue ol ĉiam la 104-a Japana Esperanto-Kongreso okazos en Jokohamo kun la kongresa temo, “Haveno peras, Esperanto peras”. Nepre partoprenu en la kongreso kun riĉaj programeroj.

Mi deziras, ke la kongresanoj havu fruktoplennan tempon, kaj ke la Esperanto-movado disvolviĝu en Hokkajdo pli kaj pli.

Gratulon pro la 81-a Hokkajda Kongreso de Esperanto en Sapporo!

SUZUKI Keiichiro,
Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto.